



Sr. AUGUSTO JIMENEZ LOIRA  
Maristestro, Direktoro de «La Suno Hispana» kaj  
Vocdonanto de H. S. p. E. kaj de la  
Grupo Valencia.

# LA SUNO HISPANA \*

**ENHAVO:** 1. 2.ª Universala Kongreso Esperantista en Genevo.—2. Sciigoj.—3. Bibliografio.—4. Novaj anoj de H. S. p. E.—5. Anoncoj.

## 2.ª Universala Kongreso Esperantista en Genevo

PAROLADO DE D.º ZAMENHOF

(Stenografita)

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!

Mi esperas, ke mi plenumos la deziron de ĉiuj alestantoj, se en la momento de la malfermo de nia dua Kongreso mi esprimos en la nomo de vi ĉiuj mian koran dankon al la brava svisa lando por la gastameco, kiun ĝi montris al nia Kongreso, kaj al Moŝto la Prezidanto de la Svisa Konfederacio, kiu afable akceptis antaŭ du monatoj nian delegitaron. Apartan saluton al la urbo Genevo, kiu jam multajn fojojn glorie enskribis sian nomon en la historion de diversaj gravaj internaciaj aferoj.

Permesu al mi ankaŭ esprimi en la nomo de vi ĉiuj koran dankon al la organizintoj de la nuna Kongreso, al la sindonaj svisaj esperantistoj, kiuj tiel multe kaj senlace laboris en la daŭro de la pa-

DISCURSO DEL DR. ZAMENHOF

(Tomado por los taquigrafos)

Estimadas señoras y caballeros:

Espero llenar el deseo de todos los presentes si en el momento de la apertura de nuestro segundo congreso doy, en nombre de todos vosotros, las más expresivas gracias al bravo país de Suiza por la hospitalidad que ha manifestado para con nuestro congreso, y al señor presidente de la Confederación suiza, que acogió con afabilidad á nuestros delegados hace dos meses. Gracias especiales á la ciudad de Ginebra, que muchas veces ha escrito ya su nombre en la historia de diversos y graves asuntos internacionales.

Permitidme también que dé en nombre de todos vosotros las gracias á los organizadores del Congreso actual, á los generosos esperantistas suizos, que tanto y tan incansablemente han trabajado en

sinta jaro, fondis preskaŭ en ĉiuj urboj de la svisa lando grupojn esperantistajn kaj diligente faris ĉion kion ili povis por sukcesa pretigo de nia Kongreso; al la Provizora Centra Organiza Komitato, kiu precipe en la persono de sia prezidanto tiel energie laboris kaj tiel diligente zorgis pri ĉiuj preparoj; fine—sed certe ne malplej grave—al tiuj kaŝitaj amikoj, kiuj per malavara fondo de la Centra Oficejo donis fortikan fundamenton por ĉiuj plej gravaj laboroj.

#### Sinjorinoj kaj sinjoroj:

Ĉe la malfermo de nia Kongreso vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferektan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. *Tian* parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe *nun*, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multajn milionojn da homoj malfacile batalas pro libereco, pro la plej elementa homa libereco, pro la *rajtoj de homo*. Pri tio ĉi mi tamen ne parolus al vi; ĉar se kiel *privata homo* ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multemiliona lando, tamen kiel *esperantistojn* tiu ĉi batalado ne povus vin tuŝi kaj nia Kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika en la dirita lando estas nun farata io kio nin kiel esperantistojn ne povas ne tuŝi: ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la *gentoj*. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando—tie la naturaj filoj de sama lando jetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento. Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado *intergenta*. Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okci-

el curso del pasado año, han fundado en casi todas las ciudades de Suiza grupos esperantistas, y con diligencia han hecho cuanto han podido para preparar con éxito nuestro Congreso; á la provizora Comisión Central de Organización, que, sobre todo en la persona de su presidente, con tanta energía ha trabajado y con tanta diligencia ha cuidado de todos los preparativos; finalmente—pero no en verdad con menos importancia—á aquellos amigos ocultos que con los desinteresados fondos\* de la Oficina central dieron una base sólida para todos los más importantes trabajos.

#### Señoras y caballeros:

En la apertura de nuestro congreso esperaréis de mí un discurso; tal vez esperaréis algo oficial, indiferente, pálido y sin substancia, como de ordinario suelen ser los discursos oficiales. Sin embargo, tal discurso no puedo daros. Yo, generalmente, no soy amigo de estos discursos; pero principalmente *ahora*, en el presente año, un discurso oficial incoloro sería gran pecado de mi parte. Vengo á vosotros desde un país donde actualmente muchos millones de hombres luchan dificultosamente por la libertad, por la más elemental de las libertades humanas, por los derechos del hombre. Sin embargo, yo no os hablaría de esto, porque si como particular cada uno de vosotros sigue tal vez con interés la difícil lucha en el país de muchos millones, sin embargo como esperantistas esta lucha pudiera no importaros, pues el congreso nada tiene de común con los asuntos políticos. Mas fuera de la lucha puramente política, en dicho país se está verificando algo que á nosotros como esperantistas no puede menos de importarnos: vemos en el mencionado país una lucha cruel entre el pueblo. Allí no es un hombre de un país que por intereses políticos de patria ataca á los hombres de otro país. Allí los hijos naturales de la nación arrójanse como crueles fieras contra hijos naturales también de la misma nación, sólo porque pertenecen á otro grupo. Extinguense á diario muchas vidas humanas en la lucha

denta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamolo!

Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi en la urbo Bielovstok rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon; en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin jetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielovstoka buĉado; al vi kiel al esperantisto mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.

Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bielovstok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun tute klare ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamolon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komunikiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de aliaj gentoj

política, pero muchas más se extingue cada día por la lucha entre el pueblo. Terrible es el estado de cosas en el polilingüe Cáucaso; terrible es el estado de la Rusia Occidental. ¡Maldito y mil veces maldito sea el odio entre los pueblos!

Cuando yo era todavía niño, en la ciudad de Bielovstok miraba con dolor el recíproco extranjerismo que dividía entre sí á los hijos naturales de una misma nación y de una misma ciudad. Y soñaba yo entonces que pasaría cierto número de años, y todo cambiaría y mejoraría. Y pasaron, en efecto, cierto número de años, y en vez de mis hermosos sueños, eché de ver una terrible realidad. En las calles de mi desgraciada patria hombres salvajes, con hachas y pértigas de hierro, se arrojaban como bestias feroces contra tranquilos habitantes, cuyo solo pecado consistía en hablar otra lengua y tener diferente religión popular que estos salvajes. Por esto rompían los cráneos y sacaban los ojos á hombres y mujeres, á caducos ancianos y á débiles niños. No quiero contaros los horribles detalles de la bestial matanza de Bielovstok; á vosotros, como esperantistas, sólo os diré que terriblemente altas y gruesas son todavía las murallas de los pueblos contra las cuales luchamos.

Se sabe que no es el pueblo ruso culpable de la feroz matanza en Bielovstok y en otras muchas ciudades, pues el pueblo ruso nunca fué cruel ni ávido de sangre; se sabe que ni tártaros ni armenios son responsables de la constante carnicería, porque ambos son pueblos tranquilos, no desean imponer á nadie su autoridad, y lo único que pretenden es que les dejen vivir tranquilos. Se sabe ahora con toda claridad que es culpable una chusma abominable de criminales que por medios diversos los más innobles, con mentiras y calumnias diseminadas á granel fomentan artificiosamente un odio terrible entre las gentes. Pero ¿por ventura las más grandes mentiras y calumnias podrían dar tales frutos de terror si la gente se conociese recíprocamente, si no estuviesen levantadas entre ellos esas altas y gruesas murallas que no les permiten libremente

estas tute tiaj samaj homoj, kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas ĵajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia! Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon libere konatiĝi kaj komunikiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidus en diversaj lokoj.

Ni ne estas tiel naivaj kiel pensas pri ni kelkaj personoj, ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝeloj; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de *tiuĵ* bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinludado.

Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo ke ni parolu pli klare kaj precize.

El la deklaro unuanime akceptita en la Boulogne'a Kongreso ni ĉiuj scias, kio estas la Esperantismo en rilato praktika; el tiu ĉi deklaro ni ankaŭ scias, ke «Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas». Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono kiu uzas Esperanton sole kaj ekskluzive por celoj praktikaj, Esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton por gajni per ĝi monon, Esperantisto estas persono kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi, Esperantisto fine estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj

comunicarse entre sí, ni ver que los miembros de otros bandos son hombres enteramente iguales á los miembros del nuestro, que su literatura no predica horrendos crímenes; sino que tiene la misma moral, los mismos ideales que el nuestro? Romped, romped los muros entre los pueblos, dadles facilidad para que libremente puedan conocerse sobre un fundamento neutral, y sólo entonces podréis hacer desaparecer esas ferocidades que ahora vemos en diversos puntos.

Nosotros no somos tan cándidos como piensan algunas personas, no creemos que una base neutral hará á los hombres ángeles: sabemos que los hombres malos, después seguirán también malos; pero creemos que la comunicación y el conocimiento mutuo sobre un fundamento neutral, al menos alejará una gran porción de esas ferocidades y crímenes que son causados, no por mala voluntad, sino simplemente por el desconocimiento mutuo y obligada imposición.

Ahora, cuando en diferentes lugares del mundo la lucha entre los pueblos se ha hecho tan cruel, nosotros los esperantistas debemos trabajar con más energía que nunca. Pero para que nuestro trabajo sea fructífero, debemos ante todo explicarnos bien la idea interna del esperantismo. Todos inconscientemente hemos con frecuencia aludido á esta idea en nuestros discursos y escritos, pero nunca habíamos hablado de ella con más claridad. Hora es ya de que hablemos con más claridad y precisión.

Por la declaración unánimemente aceptada en el congreso de Boulogne, todos sabemos qué es el esperantismo con relación á la práctica. Por esta declaración también sabemos que es llamada esperantista toda persona que usa el Esperanto, sean cualesquiera los fines para que lo emplea. Por consiguiente, esperantista es, no sólo el que usa el Esperanto exclusivamente para fines prácticos, sino aquel que lo emplea para ganar dinero; esperantista es aquel que usa el Esperanto sólo por divertirse; es, finalmente, esperantista aun aquel que emplea el Esperanto para fines los más innobles y

plej malnoblaj kaj malamaj. Sed krom la flanko praktika, deviga por ĉiujkaj montrita en la Deklaracio, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean. Tiun ĉi flankon diversaj Esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversa maniero kaj en la plej diversaj gradoj. Tial, por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis lasi al ĉiu plenan liberecon akcepti la internan ideon de la Esperantismo en tiu formo kaj grado, kiel li mem deziras, aŭ—se li volas—eĉ tute ne akcepti por la Esperantismo ian ideon. Por demeti de unuj Esperantistoj ĉian respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj esperantistoj la Bulonja Deklaracio precizigis la oficialan, de ĉiuj sendispute akceptitan esencon de la Esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn: «Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia persono ligas kun la Esperantismo estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas». Sed bedaŭrinde la vorton «privata» kelkajamikoj esperantistoj klarigis al si en la senco de «malpermesata», kaj tiamaniere anstataŭ konservi por la interna ideo de la Esperantismo la eblon tute libere disvolviĝi, ili volis tiun ideon tute mortigi.

Se ni, batalantoj por Esperanto, pravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiuj voĉoj kiuj diras: «Esperanto estas nia lingvo; evitu ligi eĉ tute private la esperantisman kun ia *ideo*, ĉar alie oni pensos ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj kiuj ne amas tiun ideon! Ho kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas *ĉin* elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo

abominables Mas fuera de este aspecto práctico, obligatorio para todos y manifestado en la declaración, el esperantismo tiene también otro aspecto, no obligatorio, pero sí mucho más importante, el aspecto ideal. Los esperantistas pueden explicarse este aspecto de modo el más variado y en los más diferentes grados. Por eso, para evitar toda desavenencia, los esperantistas han decidido dejar á cada uno en plena libertad de aceptar la idea interna del esperantismo en la forma y grado que sea de su gusto, ó, si él quiere, hasta no aceptar idea alguna para el esperantismo. Para apartar de unos esperantistas toda responsabilidad en los hechos é ideales de los demás, la declaración de Boulogne precisó la esencia oficial del esperantismo, aceptada indiscutiblemente por todos, y añadió las siguientes palabras: «Toda otra esperanza ó ilusión unida al esperantismo por esta ó aquella persona, asunto es suyo, puramente privado, del cual el esperantismo no responde». Pero desgraciadamente la palabra «privado» fué interpretada por algunos amigos esperantistas en el sentido de «prohibido», y de este modo, en lugar de conservar para la idea interna del esperantismo la facilidad de desenvolverse libremente, quisieron matar del todo esta idea.

Si nosotros, campeones del Esperanto, por voluntad propia hemos dado al mundo entero el derecho pleno de mirar al Esperanto por el lado meramente práctico, y usarlo sólo para nuestra utilidad, esto, como se comprenderá, á nadie da derecho para exigir que todos veamos en el Esperanto solamente un negocio práctico. Desgraciadamente, en este último tiempo han sonado entre los esperantistas voces que dicen: «El Esperanto es solamente una lengua; evitad unir, aun en el terreno puramente privado, el Esperantismo con alguna idea, pues de otro modo se pensará que todos tenemos esta idea, y disgustaremos á diversas personas que no son partidarias de esta idea». ¡Oh, qué palabras! Por el temor de que disgustaremos, tal vez, á aquellas personas que quieren ellas mismas em-

de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto kaj ni ekkrios kun abomeno: «Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!»

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo—vi ĉiuj sentas ĝin tre bone— estas *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*. Tiu ĉi ideo akompanadis esperantistmon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la unua tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano; kiam antaŭ dudek ok jaroj rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj festis la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj: «malamikeco de la nacioj falu, falu, jam estas tempo.» Nia himno kantas pri la «nova sento, kiu venis en la mondon», ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj de la iniciatoro kaj de la nunaj Esperantistoj ĉiam spiras tute klare tiun saman ideon.

plear el Esperanto para asuntos prácticos para sí, nosotros debemos todos arrancar de nuestro corazón esa parte del Esperantismo que es la más importante, la más santa; esa idea que ha sido el fin principal del Esperanto, que fué la estrella que ha guiado siempre á los propugnadores del Esperanto. ¡Oh, no, no, nunca! Con enérgica protesta yo desecho esta exigencia! Si á nosotros, primeros luchadores por el Esperanto, se nos obliga á que eyitemos en nuestra acción toda idea, nosotros, indignados, haremos jirones y quemaremos todo cuanto hemos escrito para el Esperanto, aniquilaremos con dolor los trabajos y sacrificios de toda nuestra vida, arrojaremos lejos la estrella verde fija sobre nuestro pecho, y exclamaremos con abominación: «Con ese Esperanto que debe servir exclusivamente á los fines del comercio y de la utilidad práctica, nosotros no queremos tener nada común.»

Vendrá tiempo, cuando el Esperanto' habiéndose hecho posesión de toda la humanidad, perderá su carácter ideal; entonces ya se hará una mera lengua, ya no se luchará por ella, ya se le sacará entonces provecho. Pero ahora que casi todos los esperantistas son no explotadores, sino luchadores, del todo estamos contestes en que al trabajo por el Esperanto nos instiga no el pensamiento de la utilidad práctica, sino solamente el pensamiento sobre la grande é importante idea que entraña la lengua internacional. Esta idea—todos la sentís muy bien—es *la fraternidad y justicia entre todos los pueblos*. Esta idea acompañó al Esperantismo desde el primer instante de su nacimiento hasta nuestros días. Ella instigó al autor del Esperanto cuando era todavía un tierno niño; cuando hace veintiocho años una reunión de jóvenes de diferentes clases del Gimnasio festejó la primera señal de vida del futuro Esperanto, ellos cantaron un himno, en el cual, después de cada estrofa, se repetían las palabras: «Caiga que ya es hora, caiga la enemistad de las naciones». Nuestro himno canta «el nuevo sentimiento que ha venido al mundo»; todas las obras,

Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉio parolis pri ĝi, kaj sindone laboris. Kial do aliĝis al ni la personoj kiuj vidas en Esperanto «nur lingvon»? Kial ili ne timis ke la mondo kulpigos ilin pri granda krimo, nome pri la deziro helpi al iom-post-ioma unuiĝo de la homaro? Ĉu ili ne vidas, ke iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj kaj ke ili senkoncise revas pri tio sama, pri kio *ni* revas, kvankam pro neĝusta timo antaŭ sensencaj atakantoj ili penas tion ĉi nei?

Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco—ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto—ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la lito de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiganta vivo, ĉu ili pensis tiam pri ia praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna *ideo* entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la *korpojn* de la homoj eĉ ne tial ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn.

Vi memoras, kiel forte ni ĉiuj estis entuziasmitaj en Bulonjo ĉe P. Maro. Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en la tiea kongreso, konservis pri ĝi la plej agrablajn kaj plej entuziasman memoron por la tuta vivo, ĉiuj ĝin nomas «la neforgebla kongreso». Kio do tiel entuziasmigas la membrojn de la kongreso? Ĉu la amuzoj per si mem? Ne, ĉiu ja povas

palabras y actos del iniciador y de los actuales esperantistas, siempre respiran con toda claridad esta misma idea. Nunca hemos ocultado nuestra idea, nunca pudo haber ni la menor duda sobre ella, pues todo hablaba y desinteresadamente trabajaba por ella. ¿Por qué, pues, se han adherido á nosotros las personas que no ven en el Esperanto más que una mera lengua? ¿Por qué no han temido que el mundo les hiciera culpables de un gran crimen, es decir, del deseo de ayudar poco á poco á la unión de la humanidad? ¿No ven que sus palabras están en contradicción con sus propios sentimientos y que inconscientemente sueñan lo mismo que nosotros soñamos, aunque por un vago temor ante insulsos ataques se esfuerzan en negarlo?

Si voluntariamente pasé la mejor parte de mi vida con grandes sufrimientos y sacrificios, y no me reservé siquiera los derechos de autor, ¿lo hice acaso por alguna interesada utilidad? Si los primeros esperantistas se expusieron con paciencia, no sólo á la constante burla, sino también á grandes sacrificios, y como ejemplo, una pobre maestra sufrió necesidad largo tiempo sólo para poder ahorrar algo para la propaganda del Esperanto, ¿lo hicieron por alguna utilidad práctica? Si con frecuencia personas en el lecho de la muerte me escribieron que el Esperanto era el único consuelo de su espirante vida, ¿pensaban ellos entonces en alguna práctica utilidad? ¡Oh, no, no, no! Todos únicamente se acordaban de la idea interna contenida en el Esperantismo; todos amaron el Esperanto, no porque aproximaba recíprocamente los cuerpos de los hombres, ni aun porque aproximaba los cerebros, sino solamente porque aproxima sus corazones.

Vosotros recordáis con qué fuerza estábamos todos entusiasmados en Boulogne. Todas las personas que tomaron parte en aquel Congreso han conservado de él el más agradable y entusiasta recuerdo para toda su vida, todos le llaman «el inolvidable Congreso». ¿Qué fué, pues, lo que entusiasmó á los miembros del Congreso? ¿Las diversiones por sí

havi sur ĉiu paŝo multe pli grandajn amuzojn, aŭskulti teatraĵojn kaj kantojn multe pli bonajn kaj plenumatajn ne de nespertaj diletantoj, sed de plej perfektaj specialistoj! Ĉu nin entuziasmigis la granda talento de la parolantoj? Ne; ni tiajn ne havis en Bulonjo. Ĉu la fakto ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiu kongreso de samnacioj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen nenio nin entuziasmigas. Ne, vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigis ne la amuzoj per si mem, ne la reciproka sinkomprenado per si mem, ne la praktika utileco, kiun Esperanto montris, sed la interna *ideo* de la esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en nia koro. Ni sentis, ke komenciĝas la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentis la spiriton de ĉiuhoma frateco. Ni konsciis tre bone, ke, ĝis la fina malapero de la muroj, estas ankoraŭ tre kaj tre malproksime; sed ni sentis, ke ni estas atestantoj de la unua forta ekbato kontraŭ tiuj muroj; ni sentis, ke antaŭ niaj okuloj flugas ia fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tre nebula, kiu tamen de nun ĉiam pli kaj pli korpigiĝados kaj potenciĝados.

Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti nur afero de praktika utileco. Ĉiu, kiu uzas Esperanto aŭ laboras por ĝi, estas esperantisto, kaj ĉiu esperantisto havas plenan rajton vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvarman internacian kompreniĝilon, similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan. *Tiaj* esperantistoj kredeble ne venas al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj, praktikaj aŭ por malvarma diskutado pri demandoj pure lingvaj, pure akademijaj, kaj ili ne partoprenos en nia ĝojo kaj entuziasmo kiu eble ŝajnos al ili naŭva kaj infana. Sed tiuj esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia *koro*, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan *ideon*; ili ne timos, ke la mondo moke nomos ilin utopiistojn kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj. Ĉiu nia nova kongreso fortiki-

mismas? No, cada cual puede tenerlas á cada paso mucho mayores, escuchar representaciones y cantos mucho mejores y desempeñados no por inexpertos aficionados, sino por consumados especialistas. ¿Nos entusiasmó el gran talento de los oradores? No, no los tuvimos en Boulogne. ¿Acaso el hecho de habernos entendido mutuamente? Mas en todo Congreso nacional realmente nos entendemos tan bien y sin embargo nada nos entusiasma. No, todos habéis experimentado muy bien que nada de esto nos entusiasmó, sino la idea interior del Esperantismo que todos sentíamos en nuestro corazón. Nosotros sentimos que comenzaban á caer los muros entre los pueblos, sentimos el espíritu de fraternidad de todos los hombres. Comprendimos muy bien que hasta la final desaparición de los muros hay todavía mucha distancia; pero sentimos que éramos testigos del primer golpe fuerte contra esos muros; sentimos volar ante nuestros ojos un fantasma de mejor porvenir, fantasma todavía muy nebuloso que sin embargo, desde ahora, va tomando siempre más y más cuerpo, más y más poder.

¡Sí, mis queridos colaboradores! Para el mundo indiferente, el Esperanto podrá ser un mero negocio de utilidad práctica. Todo el que emplea el Esperanto ó trabaja por él, es esperantista, y todo esperantista tiene pleno derecho á ver en el Esperanto sólo una lengua, un medio sencillo, frío, internacional, de comprensión, parecido al de los marinos, aunque más perfecto. Tales esperantistas es de creer que no vendrán á nuestros Congresos, ó sólo vendrán con fines explorativos, prácticos, ó por la fría discusión de cuestiones puramente lingüísticas, puramente académicas, y no tomarán parte en nuestra alegría y entusiasmo, que tal vez les parecerá sencillo é infantil. Mas aquellos esperantistas que pertenecen á nuestra causa no con su cabeza sino con su corazón, siempre sentirán y apreciarán en el Esperanto, ante todo, su idea interna; no temerán que el mundo por burla los llame utopistas, y los arrastradores nacionales hasta atacarán su ideal



gos en ili la amon al la interna ideo de la esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco.

como un crimen; ellos estarán orgullosos del nombre de utopistas. Cada nuevo Congreso nuestro fortalecerá en ellos el amor á la idea interna del Esperantismo, y poco á poco nuestros Congresos anuales se harán la fiesta constante de la humanidad y de la fraternidad humana.

## Sciigoj

*Esperanto en la reĝaj palacoj.*—Oni tre bone scias ke la Greka reĝo estas ankaŭ fervora amanto de nia kara lingvo kiun li lerte parolas; kaj estas pruvo ke li faras propagandon en sia familio la sciigo kiun ne legas en «The Daily Cronich» de la 26 de Novembro, t. e. ke la princo Olaf el Norvegujo lernas esperanton; same faras la princoj de la reĝa familio angla.

**Francujo.**—Internacia Konsulejo Esperanta estas kreata, kiel de publika utileco, ĉe la komerca, mara kaj industria arbo de St. Nazaire-sur-Loire (Francujo). Ĝi oficiale estis fondita je la tuta aprobo de la Administracio franca de l'urbestraro, de la Fremdaj Konsuloj, de la Komerca Estraro, de la Komercistoj, de l'industrioj kaj marveturaj societoj.

La Konsulo celadas kaj klopodas por:  
1.<sup>a</sup> Helpi ĉiujn gefremdulojn de ĉiuj lingvoj aŭ nacioj kiam ili venas ĉe St. Nazaire-sur-Loire (Francujo).

2.<sup>a</sup> Helpi ĉiujn komercistojn de la tuta mondo en iliaj komercaj aŭ privataj aferoj, estante perulo inter la diversaj francaj kaj fremdaj marveturaj kaj fervojaj societoj, kaj ankaŭ apud la maristaj makleristoj; k. a.

